



Boletín

Nº 368 novembro/dicembro 2004

pío
baroja:
suzana
kaj la ĉasistoj
de muŝoj



hispana literaturo

Brila!

Asociación de utilidad pública

Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Aperanta de 1949

Redaktisto: Miguel Gutiérrez Adúriz;
Los Coteros 1-C, 2-I; ES-39600
Muriedas; Cantabria;
bulteno@esperanto-es.net

*Nota: Pri la enhavo de la artikoloj
respondekas nur la respektivaj aŭtoroj.
La redaktisto rajtas libere rifuzi ne
petitajn artikolojn.*

Hispana Esperanto-Federacio

Rodríguez San Pedro 13, 3º, 7;
ES-28015 Madrid;
Tel.+faksilo: +34.(9)1.446.80.79
Konto ĉe BBVA :
0182-1252-31-0204011961
Admin@esperanto-es.net
www.esperanto-es.net


Estraro

Prezidanto: Miguel A. Sancho.
Vicprezidanto: José M. Galofré.
Sekretario: Manuel Parra.
Kasisto: Pedro Garrote.
Vicsekretario: Marcos Cruz.
Voĉdonantoj: Luis Hernández,
Augusto Casquero
Miguel Gutiérrez.

Enhavo

Letero de la Prezidanto	2
Ski-Semajno	3
Seminario	3
Kiel kilote festi? (P.L.)	4
Atentu	5
Pri Grupoj, Asocioj kaj tiel plu.	6
10a Andaluza Kongreso (M.Z.)	12
Ĝustigo (M.Z.)	12
3aj Someraj Dialogoj (S.A.)	13
12a Internacia Semajno	14
Fundación Esperanto	17
Al Antonio Valén (Frateco)	17
Augusto, Ada, Esperanto (G.C.F.)	18
Premio Ada Sikorska al Augusto Casquero	19
Ĉirkaŭ la mondo	22
Profesiaj studoj pere de E-o (A.C.)	23
Muziko (Vinilkosmo)	24
Alia grava atingo (F.F.)	25
Lasthoraj novaĵoj	25
Biblioteko Juan Régulo (A.M.)	26
Indymedia en Esperanto (KEA)	27
Anti-internaciismo kaj Esperanto en la hispana faŝismo 1930-1936 (J.M.R.)	30
Jarabonoj kaj kotizoj por 2005	31
Aniĝilo por 2005.	32
Pola Radio kaj Libro-tago	k-d

Letero de la Prezidanto



Karaj membroj,

Forpasis jam preskaŭ ok jaroj de kiam la membroj de la nuna Estraro komencis plenumi sian taskon. Fakte, kelkaj el ĝiaj kunlaborantoj jam partoprenis en la antaŭa gvidorgano de la Federacio. Venis do la momento kiam parta anstataŭo de la Estraro ŝajnas prudenta. Ne nur ni, kiuj iom laĉaj jam deziras dediĉi nin al aliaj poresperantaj aferoj, sed ankaŭ la Federacio bezonas tiun ŝanĝon. Estas nekontesteble ke tro longa deĵorperiodo normale kaŭzas la perdon de la komenca elano, kaj tion oni ne povas permesi, ĉar ĝi endanĝerigus la agadon de HEF, kaj la bonfarton de la hispana Esperanto-movado.

Tial, la Ĝenerala Kunsido de Membroj de HEF devos nepre elekti novan Estraron en la venonta kongreso, kiu tre verŝajne okazos en urbo proksima al Madrido —Guadalajara aŭ Alcalá de Henares—, en julio 2005.

Ne ĉiuj estraranoj ĉesos deĵori. Serĉataj estas kandidatoj por la postenoj de Prezidanto, Sekretario kaj Redaktisto de Boletín. Ekzistas jam kelkaj proponoj por tiu lasta posteno, tamen la membraro havu kiel eble plej ampleksan nombron da kandidatoj por elekto.

Nun, permesu ke mi prezentu al vi mian personan vidpunkton pri la ecoj, kiujn devus havi la homoj dezirantaj okupi tiujn postenojn. Tion mi faras nur por orientado, ĉar, kompreneble, ĉiu membro havas rajton sin proponi, kaj nur la ceteraj membroj, kaj ne mi aŭ la estraro, povas decidi.

La prezidanto, laŭ mi, devas flue paroli kaj skribi Esperanton, tamen ne necesas esti verkisto. Gravas la kapablo facile elturniĝi ĉe ĵurnalistoj kaj politikistoj. La prezidanto ĉefe ŝajnu entuzisma, sed igu aliajn vere tiajn. Estu modera, klopodu kompreni alies vidpunktojn, kaj jam nun estu simpatie konsiderata de la

plejmulto de la membraro. Ĝuste do, li aŭ ŝi ne estu kiel mi...

La sekretario bone parolu kaj skribu en Esperanto, kapablu administri kaj havu emon por kunordigo de laborteamoj kaj projektoj.

La redaktoro de Boletín devas paroli kaj skribi Esperanto altnivele. Konvenas emo al literaturo, kaj eĉ tre gravas kono pri kompostigo kaj uzo de komputiloj por tiu celo.

Fine, mi devas aldoni ke la kandidatoj ricevos ĉian necesan helpon de la eksstraranoj, de kiam ili emposteniĝos. Fakte, la eksiĝintoj restos ligitaj al HEF, kaj daŭre kunlaboros, laŭ necese, en la agado de la Federacio.

Ĉi tiu letero koncernas vin ĉiujn. Estas grava afero: la daŭrigo de la laboro de la Estraro, kaj do ĝia natura evoluo, estas baza fundamento por la plua ekzisto de Esperanto en Hispanio. Partopreni la estraron estas devo kaj rajto de ĉiuj membroj.

Ĉiuj el vi, kiuj deziras kandidati, bv. leteri al HEF. Se vi havas dubojn aŭ deziras ion rimarkigi, ne hezitu tion fari.

Ricevu plej elkoran saluton en mia nomo kaj en la nomo de la tuta Estraro de HEF.

Miguel Á. Sancho

Prezidanto de HEF

Ski-semajno

La 46a Internacia E-Skisemajno okazos en La Molina, hotelo Supermolina en la katalunaj Pireneoj, de la 23a ĝis la 28a de januaro danke al la agado de Hispana Esperanta Fervojista Asocio. La kosto de la aliĝo esas 15 eŭroj. Interesitoj kontaktu: HEFA; Apartat 15027; 08080 Barcelona.

Ankaŭ oni povas ricevi aliĝilon pere de intereto, petante ĝin al la redaktejo de Boletín, kies adreso estas:

bulteno@esperanto-es.net

Bonan “verdan” skiadon!


Seminario

Preparante la ŝanĝon de la Redaktisto de Boletín, okazonta en la Hispana E-Kongreso de 2005, la Estraro de HEF antaŭvidas la eblecon organizi seminarion por interesitoj pri kompostado de revuo. Kvankam la celo estas informi kaj, eventuale, prepari la novan redaktiston de Boletín, aliaj interesitoj rajtos aliĝi, kvankam la nombro estus nepre limigita. La seminario estus esence praktika, kaj ĝi okazus, laŭ necese, dum semajnfino en la Centra Oficejo de HEF.

Interesitoj kontaktu la CO-n.

Kiel kiĥote festi?

Okaze de la 4a centjariĝo de la unua eldono de la Kiĥoto, organiziĝos venontjare multaj prikulturaj aktivaĵoj kunordigataj de la “Comisión IV Centenario Don Quijote”. Kaj HEF nepre devas iel kontribui. Ja ni havas la plej bonan atuton: mirindan tradukon de la verko far Fernando de Diego.



Nu, kiel kiĥote festi sen frenezi? Por trovi taŭgan respondon, la 13an de novembro kuniĝis kelkaj aktivuloj en la madrida oficejo. La propono partopreni tiun jubileon venas de la ĝenerala kunsido de HEF en Bilbao. Poste riceviĝis en la oficejo pluraj interesaj sugestoj priaj. El la kombino de

tiuj ideoj plus la cerbostreĉo de la kunsidantoj en la HEF-ejo naskiĝis sekva dokumento:

Projekto Kiĥoto-2005


Nia ĝenerala strategio estu “profiti de alies elano”. Tial ni proponu nian kunlaboron al ĉiu publika aŭ privata entrepreno organizita por la jubileo.

a) Eblaj aktivaĵoj realigotaj de HEF:

·Propono de kiĥota ekzemplero al Biblioteca Nacional por la ekspozicio pri la unuaj eldonoj de la verko en ĉiuj lingvoj.

·Proponi al Instituto Cervantes donacadon de 42 ekzempleroj de Don Quijote, ĉar tiomaj estas iliaj sidejoj dise en la mondo.

·Donaci al la “Casa de Cervantes”, en Alcalá de Henares, ekzempleron de Don Quijote.



Esperanto ne manku

·Universidad de Alcalá de Henares. Proponi al ĝi informon pri la E-traduko por aldoni al la pretigata “Gran Enciclopedia Cervantina”. La “Centro de Estudios Cervantinos” pretigis jam inter 4.000 kaj 4.500 paĝojn de tiu enciklopedio —ĉirkaŭ 70% el la tuta projekto— kaj pri kiu kunlaboris ĝis nun 400 plej kompetentaj fakuloj el la tuta mondo.

·Proponi al la publika entrepreno “Don Quijote de la Mancha 2005, S.A” la tradukon de la subtitoloj de la kartuna filmo “Quijote y Sancho” de Romagosa. Jam ekzistas subtitoloj en la hispana kaj la angla.

·Lanĉi desegnokonkurson por infanoj el la tuta mondo, eble pere de ILEI, kun la ideo, ekzemple, “Tia mi vidas Kifoton”.

·Malfermo de aparta fako en nia retpaĝaro por diskonigi ĉiujn priprojektajn agadojn.

·Okazigo de la venontjara hispana kongreso en La Mancha aŭ Alcalá de HEF-Bulteno n-ro 368

Henares, kun la temo: “Don Quijote habla esperanto”.

b) Eblaj aktivaĵoj realigitaj de la grupoj:

·Denova partopreno en la ĉiujara maratona legado de la Kifoto.

·Donacado de la verko al lokaj institucioj kaj bibliotekoj.

·Kontaktado en ĉiu aŭtonomaj komunumoj de la kreitaj regionaj societoj por la festado de la datreveno kaj proponi kunlaboron.

·Profiti el la dokumentoj aperigitaj en la HEF-paĝaro por propraj celoj.

·Informi la lokan ĵurnalistaron pri la ĝenerala projekto kaj la loka ĉi-rilata agado.

·Informi pri via grupa aktivado, tiel ke la ceteraj grupoj povas ankaŭ profiti de viaj bonaj ideoj.


Ĉu tro ambicia projekto? Nu, eble ne ĉiuj aktivaĵoj realiĝos sed, ĉu ne ni ŝuldas iom da realisma revemo al la plej misfortuna glora kavaliro el nia literaturo?

Prepara Laborgrupo

ATENTU!

RNEI disponas ekzempleron de “Kristnaska kordo”, disko kun kristnaskaj kantoj en Esperanto. Tial do estus interese ke la venontan decembron ni ĉiu petu de la Nacia Radio disaŭdigon de unu el la kantoj, ekzemple la hispanan “Rin rin!”

esperanto
12/13



Pri Grupoj, Asocioj kaj tiel plu.

Andaluzio

En la ĵus okazinta 10a Andaluza Kongreso de Esperanto (vidu sur la 10a paĝo) aperis la 74a kaj 75a numeroj de la revuo Gazeto Andaluzia.

La 74a numero 74 enhavas informojn pri la movado en Andaluzio, kulturalan kunlaboraĵon de W. Gunther, historian rakonton pri kiamaniere la vikingoj provis invadi Al-Andaluson en la 9a jarcento. Aperas ankaŭ interlingvistika studo pri la help-lingvo "Toki Pona", la protokolo de la ĝenerala kunsido de AEU okazinta en Malago komence de oktobro, artikolo pri nia 92-jaraĝa samideano de Linares S-ro Alfonso Escamilla, pri la movado en Jaeno dum la 3a jardeko de la pasinta jarcento. Fine aperas ankaŭ la branĉoj "Andaluza Literaturo tradukita en esperanton", Flamenko, "Misteroj kaj Legendo de Andaluzio" kie oni parolas denove pri la "vizaĝoj de Belmeŝ", turisma paĝo pri la vilaĝo Alcalá la Real en Jaeno kaj poezio de nia samideano Gunther.

La 75a numero 75 la kongreslibro de la ĵus okazinta 10a AK de Esperanto.

Do, la tuta enhavo pritraktis la kongreson. La venonta numero aperos fine de la jaro.

José María Rodríguez Hernández

Aragono

Antonio Marco Botella, verkisto kaj antaŭa redaktoro de Boletín, aperis en dupaĝa artikolo pri la eliro de ekzilitoj post la milito en la ŝipo Stanbrook, aperinta en la dimanĉa eldono de El Heraldo de Aragón. En la artikolo aperas fotoj pri li, kaj oni plurfoje mencias lian esperantistecon. La tuta artikolo aperis ankaŭ en Interreto.

J. A. del Barrio

Eŭskio / Vaskio

Jesus-Miguel Garcia Iturrioz aperis en la programo "Forum" de la vaska televido ETB la 14an de oktobro.

Kantabrio

* KantEA decidis fari kuraĝan investon provizante la plej gravajn bibliotekojn de nia Komunumo per la komputila kurso "Curso básico completo de Esperanto" produktita de FEL.

* Sub la devizo “Esperanto por ĉiuj”, KantEA lanĉos kampanjon por havigi k-diskon kun kopio de komputila kurso senpage al ĉiu persono kiu vizitos la sidejon de la asocio por ĝin peti.

* La 19an de novembro la asocio organizis eskursion al la Kanjono de Ebro. Oni ĝuis de la promenado, la bona manĝo kaj la belega pejzaĝo, same kiel en la antaŭa ekskurso, okazinta en junio, al la mirinda Monto Candina.

* La 17an de decembro, KantEA festos la “Tagon de la Libro en Esperanto” (Zamenhof-tago).

* KantEA partoprenas la kristnaskan loterion per la numero 55.207. Danke al la disvendado de loteriaj biletoj, la asocio kapablos disvolvi diversajn agadplanojn, ekzemple rilate al la publikaj biblioteko de la Komunumo.


* Unuafoje KantEA dissendis sian bultenon “Saluton!” al la membraro en PDF-formato pere de Interreto.

* KantEA studas sian kunlaboron kun HEF en rilato al la jubileo de la verko de Cervantes “Don Kihoto”.

M. Zocato

Kastilio-Leono

* La naŭan de novembro, la Direktoro de Fundación Esperanto, José Antonio del Barrio, transdonis al la Direktoro de la Publika Biblioteko de Ávila, Ángel Clerencia, ekzempleron de “Gran Diccionario Español-Esperanto” de Fernando de Diego, kune kun ekzemplero de la HEF-Bulteno n-ro 368



Donaco al la Publika Biblioteko de Ávila: José Antonio del Barrio kaj Ángel Clerencia

libro de Antonio Valén “El esperanto: lengua y cultura”.


Ĉi evento donis la okazon por gzeitarkampanjo, kies rezulto estis la aperigo de la novaĵo en pluraj amaskomunikiloj, intervjuoj en du ĉefaj lokaj radiostacioj, de Radio Nacional kaj Cadena SER, kaj en la ĵurnalo “Ávila Digital”.

Ĝis tiam, la Biblioteko disponis nur E-lernolibron de la jaro 1935, ŝajne ŝimantan en la arĥivoj. Espereble, la donaco helpos vigligi la movadon en tiu vasta regiono, kiu jam ricevis kelkajn el la antaŭaj donacoj de la Granda Vortaro.

M. Zocato

* En la internacia filmfestivalo Seminci (Internacia Kin-Semajno),

okazinta en Valadolido, oni prezentis la esperantlingvan kurtan filmon (7 min. kaj 38 sek.): “La eta knabino (aŭ kiel oni trovas ian helpon)” de Samir (Svislando). La filmeton, kiun ĉiu esperantisto povas aĉeti ĉe UEA (17,70 eŭrojn), estas



Nepre apogindas la laboro ĉe la universitatoj

fabelo pri solidareco de malsamaj estaĵoj. Fakte ĝi jam sukcesis en pluraj internaciaj festivaloj, kaj en Valladolido ĝi estis dufoje projekciata en la urbocentra kinejo Mantería.

Rodrigo Portela

Katalunio

* KAE, Kultura Asocio Esperantista, organizis kvinan E-kurson kunlabore kun la Aŭtonoma Universitato de Barcelono, laŭ reciproka interkonsento de ambaŭ institucioj. Ĉi-jare la lernantoj, kiuj elektis Esperanton kiel lernobjekton, ricevos du “kreditojn”.

La kurso daŭras 30 horojn, de la 14a de oktobro ĝis la 2a de Decembro, kaj la klasoj okazas marde kaj ĵaŭde de la 17a ĝis la 19a horo en salono de la propra Universitato. Gvidas la kurson s-ano Martí Guerrero Cots.

La koncernan informadon pri la kurso oni efektivigis, ene de la universitata

medio, distribuante 300 grandajn afiŝojn kune kun 6.500 malgrandajn. La kurson partoprenas 12 gelnantoj.

José María Galofré

* KAE daŭre organizas siajn Babiladojn. En novembro ĝi okazis en Barcelono kaj la temo estis “La amo (en la bona senco de la vorto)”.

* La Asocio de E-Fervoĵistoj, nome de diversaj E-Grupoj de Katalunio, transdonis ekzempleron de Don Quijote al la biblioteko de Kastelo Perelada, unu el la plej grandaj privataj bibliotekoj de Eŭropo, kiu venontjare organizos ekspozicion pri Cervantes.

* La 12an de decembro BEC organizos, laŭ peto de la ceteraj E-grupoj, la Librofeston (Zamenhof-tagon). Okazos prelego, kun diapozitivoj, fare de Pere Navarro-Rosinés “De la akvo al la Tero”. Omaĝparolado pri Zamenhof fare de Martí Guerrero. “Poemoj kantataj esperante” fare de Ricard S. Güell, kaj debato gvidata de Luis Serrano “Eŭropa Unio, konstitucio, laboristaro”.

Salvador Aragay

Valencio

* Grupo Esperanto de Valencia festos la Zamenhof-tagon la 18an de decembro. Matene, je la 12a h., prelegos Berta Raposo kaj José Martínez en la sidejo de la Asocio, pri la temo “La eŭropaj ling-

HEF-Bulteno n-ro 368

voj kaj Esperanto”. Kaj poste bankedo en la restoracio “La estrella”.

* GEV partoprenas en la kristnaskan loterion per la numero 19.563.

Tutlande

* En “Ciberpaís” (04.10.21), suplemento de ĵurnalo “El País”, aperis letero de s-ano José María Salguero reage al antaŭa informo en kiu tiu gazeto citis Esperanton, kune kun aliaj naŭ “ekzotaj” lingvoj uzataj en la interreta enciklopedio Vikipedio. En sia reago, Salguero prave argumentas ke nur du el la menciitaj lingvoj, afrikansa kaj latino, superas la nombron de mil artikoloj, dum la ceteraj apenaŭ havas signifan nombron de artikoloj kontraste kun la esperanta versio, kiu rangas inter la plej popularaj kun pli ol dek mil artikoloj!

Darío Rodríguez

* Aperis en la reto la 64a numero de Kajeroj el la Sudo. Oni povas legi ĝin je <http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k64.htm> kaj <http://213.172.47.3/gazetoteko/kajeroj/k64.htm>, kaj se oni preferas la PDFn version, ĉe:

<http://213.172.47.3/gazetoteko/hale/index.html>

kaj <http://www.gazetoteko.com/hale/index.html>.

Jesuo de las Heras

* Legeblas jam en interreto la prelego, kiun José Antonio del Barrio faris pri la sciencisto Leonardo Torres Quevedo kaj lia rilato al Esperanto. Ĉe:

<http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/historio.htm>



“El esperanto: lengua y cultura”
elektita kiel “verko de la semajno”

Ankaŭ legeblas la prelego, kiu la sama aŭtoro faris en la pasinta kongreso de Bilbao pri historia esperantisto, Juan Gracia, membro de la magistrato de Bilbao kaj konsilisto de la unua Aŭtonoma Vaska Registaro dum la intercivitana milito.

* En la retpaĝaro de kataluna CGT, oni informis pri la Kataluna E-Kongreso okazinta en Ceret.

* En la programo “Solidaridad” de RNE5, okazinta la 13an de novembro oni plurfoje menciis Esperanton en intervjuo farita al la prezidanto de “Servas”, asocio simila al nia Pasporta Servo. Fakte oni klarigis ke la nomo “Servas” venas le Esperanto. Kelkaj e-sitoj reagas.

* La retgazeto “La Semana que Vivimos” publikigis recenzon de Roberto González pri la verko “El esperanto: lengua y cultura” de Antonio Valén. La revuo elektis ĉi verkon pri Esperanto kiel “la verkon de la semajno”, ĉar ĝi estas plej noveca kaj interesa

<www.lasemana.es/ocio/>.

Svena Dun

10a Andaluza Kongreso



Jen la organiza stabo



Neatendita nombro da ĉeestantoj

Preskaŭ sepdeko da gesamideanoj de Andaluzio, Ekstremaduro, Madrido, Portugalio kaj eĉ brito, ĉeestis la 10an Andaluza Kongreson de Esperanto okazintan la 31an de oktobro kaj la 1an de novembro.

En la malfermo, post la sinprezento de la LKK (Loka Kongresa Komitato), salutis la reprezentantoj de la andaluza asocio kaj de la lokaj kluboj: Julio Herro nome de Andaluzia E-Unuiĝo kaj de la Grupo de Malago, José María Rodríguez reprezentante la Kordovan E-Asocion, Pablo Foche nome de Jaena E-Asocio, Victor Manuel Macías nome de la Onuba E-Asocio kaj Manuel Ortega nome de la Sevilja E-Asocio.

La unuan prelegon faris Antonio Rodríguez Gasch. Li parolis pri la temo

“Esperanto Hodiaŭ”. Poste, José María Rodríguez Hernández mallonge prezentis la vortaron “Gran Diccionario Español-Esperanto” de Fernando de Diego. Oni donacos ekzempleron al la Publika Biblioteko de Seviljo. Manuel Ortega Castillo faris la lastan prelegon en la manteno: “Esperanto en Internet”.

Tagmeze oni ĝuis komunan tagmanĝon, kaj, posttagmeze, venis la tempo por la pritrakto de aferoj en rilato al la disvastigo de Esperanto en Andaluzio. Oni parolis pri organizado de kursoj en la universitatoj, ellaborado de alloga TTT-paĝo de Andaluzia E-Unuiĝo, kaj kiamaniere altiri la atenton de la andaluzaj geesperantistoj kiuj ne apartenas al la regiona aŭ al la loka asocio. Sinsekve okazis pli prelego. Victor Manuel Ma-



Disdonado de diplomoj




La "oficiala" foto

cias Caro parolis pri la temo "Timoj kaj kontraŭaj opinioj al Esperanto". Fine, en la vespero, okazis la ekzamenoj element- kaj mez-nivelaj.

Lunde matene, Juan de Dios Montoto de Sarriá parolis pri la

temo "Blas Infante, Andalucismo y Esperanto", ja vere alloga prelego. Poste oni disdonis la diplomojn al la ekzamenintoj (7 elementaj diplomoj kaj 6 mezaj) kaj ankaŭ al la prelegintoj. Fine oni legis la konkludojn de la 10a Andaluza Kongreso de Esperanto.



Gajaj vizaĝoj

aranĝis surloke komunan tagmanĝon en ĉina restoracio.

Vizito al la Reĝaj Alkazaroj metis la finan punkton al la evento. Dum la vizito, turism-gvidanto detale rakontis ne nur pri la historio de la Reĝaj Alkazaroj, sed ankaŭ pri la teknikoj uzataj por ĝia konstruado. Ĉiucambre la gvidanto lerte sukcesis tiri la atendon per mirindaj rakontoj kaj informoj.

Kurioze, post la vizito, la plimulto el la gekongresanoj, malemaj al disiĝo, HEF-Bulteno n-ro 368

La kongreso estis modele preparita, la organizantoj disdonis abundan materialon al ĉiuj partoprenantoj, kaj atingis belan kaj komfortan kongresejon. En la vespero de la unua tago okazis danca spektaklo antaŭ la kongresejo, kio tiris la atenton de la preterpasantoj ankaŭ sur la grandan afiŝon de la kongreso. Oni organizis ekspozicion de libroj en kaj pri Esperanto kaj oni vendis lernolibrojn.



Antonio Rodríguez Gasch prelegas

Nu, laŭ la diro de s-ano Pablo Foché: "... la kongreso estis tre bona. La etoso estis tre amika kaj la enhavo interesa. Tio plej bona estis vidi tiom multe da komencantoj pretaj ellerni la lingvon."

Do, ĝis la venonta I la Andaluza Kongreso de Esperanto, kiu okazos venontjare en Malago.

Kompilis M. Zocato


Kontonumero de

HEF ĉe BBVA:

0182-1252-31-0204011961

Anonco

Juna viro serĉas junan virinon por stabila rilato. Skribu al: apartado de correos 5326, 46080 Valencia, aŭ al <JuCGE@hotmail.com>.



"Saturno" jen la dulingva poemaro de Jorge Camacho

Ĝustigo

En la artikoleto "Surprizo!", pri la du novaj poemaroj de la verkisto Jorge Camacho, aperinta sur la 25a paĝo de Boletín 366, enŝoviĝis misprezentado. Anstataŭ: "[...]" Saturno" estas dulingva volumo kun poemoj, originale verkitaĵoj jen en Esperanto, jen en la hispana lingvo, kun iliaj respektivaj tradukoj." Oni legu: "[...]" Saturno" estas dulingva volumo kun poemoj verkitaĵoj samtempe kaj paralele en Esperanto kaj en la hispana lingvo, plus kelkaj unulingvaj poemoj kun la responda traduko."

Komprenoble, ni varme rekomendas la legadon kaj de "Celakantoj" kaj de "Saturno". Fakte ĉi lastan libron oni povas donaci al ne esperantaj geamikoj, profitante ĝian dulingvecon.

M. Zocato

3aj Someraj Dialogoj



3aj Someraj Dialogoj en Monistrol de
Montserrat

La 4an de septembro, sabaton, komenciĝis la Someraj Dialogoj en la E-Restadejo Monistrol de Montserrat. Post la akceptado, oni legis raporton pri la agado de BEC: Dialogo okaze de la Forumo de la Kulturoj. La konfirmo ke BEC oficile peros en Hispanio la revuon La Gazeto. Nova kampanjo por allogi gelernantojn al la tri E-kursoj de la Asocio. Cetere, menciindas ke KAE denove organizos oficilalan E-kurson en la Aŭtonoma Universitato. Ankaŭ oni informis pri priesperantaj artikoloj aperintaj en “El Ciervo”, fare de Martí Guerrero, en “Sápiens”, en “Diari de Tarragona” intervjuo al Luis Serrano pri la Internacia E-Semajno, kaj en “El 3 de huit” intervjuo al Rafael Herández pri la estonteco de la Muzeo de Esperanto, kiu prezentas interesan proponon por organizi ĉi tiun institucion kiel fondajon de la vilaĝo Sant Pau d’ Ordal.

Giordano Moya prelegis pri “Humanaĵ valoroj”. Frapaj estis liaj vortoj jam de la komenco: “Ĉiu socio por kunvivi havas certajn moralajn valorojn...”, kaj li finis per: “La transiro de nia socio, disigita ankoraŭ per alfrontantaj ŝtatoj, al pli humana socio kun valoroj kapablaj por organizi pacan kunvivadon je monda HEF-Bulteno n-ro 368

skalo, ne alvenos per si mem, sed per la propra teniĝo kaj agado de la homoj”.

La tagmeza dialogo estis “La fundamentaj rajtoj en la Eŭropa Unio”. La subskribinto de ĉi tiu raporto prezentis diversajn artikolojn de la F.R. kaj faris diversajn demandojn. Ekzemple: Ĉu la landoj de EU devus ŝanĝi siajn statutojn? Ĉu la rajtoj de la enmigrintoj estas samaj kiel tiuj de la naciaj civitanoj? Ĉu la landoj de EU agas diskriminacie? Ĉe tiuj demandoj, manoj leviĝis kaj komenciĝis vigla diskutado en kiu Esperanto fluis perante malsamajn opiniojn.

La dimanĉon, je la 11a horo, okazis elementa kaj supera kursoj, kaj, tagmeze, la vilaĝa konsilantaro invitis la partoprenantojn al turisma vizito de la vilaĝo. Du gvidantoj de La Generalitat akompanis nin dum tri horoj. Fine venis la tempo de adiaŭo: Kisoj, manprenoj, ĉirkaŭbraĵoj kaj... ĝis la 4aj Someraj Dialogoj!

Salvador Aragay

12a Internacia Semajno



Inter la 2a kaj 9a de oktobro, okazis en Salou, urbo situanta ĉe la Orumita Marbordo, kun 30.000 loĝantoj (300.000 somere) la 12a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo.

Kunvenis centoj da gesamideanoj, 49 eksterlandaj, en plej agrabla etoso, kva-zaŭ ronda familio.

La 3an de Oktobro, dimanĉo, okazis la inaŭguro, kun ĉeesto de la urbestro s-ro Esteve Ferran i Ribera. Enkondukis la eventon Luis Serrano, salutis pluraj enlandaj kaj eksterlandaj gesamideanoj nome de siaj respektivaj grupoj, asocioj aŭ eĉ propranome. La urbestro paroladeti- tis pri la rolo de turismo kiel elemento ebliganta la intersanĝon de kulturoj. "Al tiu homa interkonatiĝo mankas vera lingva komunikilo kaj via laboro en tiu tereno estas vere laŭdinda". Krome, li aldonis, "mi scias, ke via movado jam de antaŭ 100 jaroj laboradas tiucele. Mi deziras al vi plenan sukceson".

Posttagmeze oni asignis la Premion "Ada Sikorska Fighiera", kiu vere estis la stelo de nia "Semajno". Ĝin ricevis Augusto Casquero el Valencio pro sia plurjardeka sindediĉa agado en la E-movado, jen enlande, jen eksterlande. Bedaŭrinde, li ne povis preni mem la premion, ĉar li troviĝis en Pollando por instruado de la hispana lingvo. Fine, nia kara Gian Carlo Fighiera emocije parolis pri sia bedaŭrata edzino kaj siaj streboj por Esperanto, sub la temo "Esperanto laŭ vojo de Ada Sikorska".

Nepre ni devas aldoni, ke la Premio naskiĝis kun daŭriga celo, oni do jam povas anonci kandidatojn por la venonta jaro.

Okazis sep prelegoj. La sabaton prelegis s-ano Manuel de Seabra pri "Literaturo en Esperanto aŭ per Esperanto kaj Esperanta aŭ per Esperanta Kulturo". Per tiu longa titolo, la verkisto celis bildigi tion, kio estas la literaturo en Espe-

ranto, kompare al tiu de aliaj kulturoj. Instrua leciono por verkemuloj.

Lundo: s-no Marc Cuffez el Ostendo prezentis “Flandrio kaj Belgio: malfacila lando”. Ampleksa rigardo pri la teritorio distribuo de la lando, ne forgesante la diversajn enlandajn instituciojn kaj ilian funkciadon. Evidente, la lingva problemo ankaŭ havis sian specialan lokon.

Mardo: s-ano Kristoforo Fettes el Irlando per sia “Irlando — historio kaj pejzaĝoj” iel translokis nin en Irlandon, ĉar pere de bildoj li prezentis ĝin kaj sian propran vastan bienon, al kiu, laŭ li, ĉiu esperantisto estas kore invitata.

Merkredo: la hispana notario de la hispana E-Movado, Antonio Marco Bottella prelegis pri “La unuaj jaroj de Esperanto en Katalunio”. Lia prelego estis resumita parto el 400-paĝa libro, kiu, ni esperas, baldaŭ estos eldonita. Do, li promeniĝis nin en konkretan epokon de la E-movado en Katalunio precipe pri la Universala E-Kongreso okazinta en 1909.


Alia prelego estis tiu de Giordano Moya, kiu elektis la temon “Esperanto kaj Mondunuiĝo. La tuto estis serioza analizo de la nuna politika, ekonomia kaj sociala situacio en la mondo. La verkisto, fidela apoganto de la interna ideo, ne forgesis prezenti la rolon de Esperanto, en tiu, laŭ li, nepre naskiĝonta sociordo.

La prelego de nia s-ana ekologo, D-ro Wolfgang Gunther el Germanio, “Ekologio kaj Esperanto”, atentigis nin pri la grava nuntempa ekologia problemo,

HEF-Bulteno n-ro 368



Malfermo de la Semajno




Botelo de ĉampano Esperanto


kvankam li klarigis, ke la nomata “verda movado” estas tute alia afero. Li lerte komparis la rolon de la ekologio en la medicina kampo kun la rolo de Esperanto en la ĉiutaga vivo de la homo. Kaj ĉio ligita, li asertis, estus grava avantaĝo por la homaro.

Nepre menciinda estis la aktorado de la trupo el Montpelier “Go-Jo” kiu per sia preskaŭ profesia talento vere amuzis la publikon.

Ni menciuj ankaŭ la subitan naskiĝon de nova trupo, sub la gvido de Rose Sanz el Parizo, kiu en la lata tago interpretis diversajn skeĉojn rilatajn al programeroj de “la Semajno”.



S-ro Luis Serrano oficiale transdonas la diplomon kaj medalon de la unua Premio Ada Sikorska Fighiera.



Hispana Esperanto-Muzeo ricevis ekzempleron de la medalo Ada Sikorska.

Du interkonaj vesperoj okazis, sabate kaj jaŭde, kun abundo da ĉampano “Esperanto” kaj aliaj frandaĵoj. Neforge-sebla, tamen, estis la distra arango de la merkredo, kun trinkado de “cremat” kaj la prezentado de “haban-kantoj” fare de la fama ensemblo “Montjuic”.

Kvar ekskursoj okazis. Unu duontaga al Hispana E-Muzeo, kies kolekton ni rigigis per la medalo Ada Sikorska, kiu jam troviĝas en ĝiaj vitrinoj. Sekve ni vizitis ĉampankelon. Alia duontaga ekskurso estis al ĉampankelo “Esperanto”, marko oficiale registrita. Alian duontagan ekskurson ni dediĉis por viziti, ĝuste en Salou, ekspozicion pri emajlaĵoj; ĝi estis tre interesa sed precipe por fakuloj. En la tuttaga ekskurso ni vizitis la Monaĥejon-Kastelon de Miravet, kaj en Tortosa ni vizitis la Katedralon kaj Kastelon, kio riĉigis iom pli nian konon pri ĉi tiu bela katalunia regiono.

La debato “Kio pri la nova Europo?” liveris multajn opiniojn pri la Europa Konstitucio. Plena konsento ja ne estis, escepte pri la fakto, ke ĉiu ĉestanto montris sian decidon ne voĉdoni sen antaŭa kono de la konstitucia teksto.


“La Semajno” ne forgesis la kernon de Esperanto, tio estas la kursoj. Tial s-ano Salvador Aragay gvidis superan kurson, kiun multaj “semajnuloj” ĉeestis. Nu, evidentis ke la esperantistoj vere interesigis pri la lingvo. Jes, ankaŭ estis kontentiga libro-servo, en kiu sen la grandeco de tiuj de UEA, la partoprenantoj interesigis pri la libroj kaj ilin aĉetis.

En la vendreda nokto de ĉiu Semajno, la organizantoj alvokas la partoprenantojn por prezentado de kritikoj... kaj laŭdoj. Kaj ĉiutage, meze de bonega etoso, la programo finiĝis je la noktmezo.

Luis Serrano Pérez



FUNDACIÓN
ESPERANTO



Jen la ...respondo!

Kontribuu pere de:

Iber-Caja

2085-0101-13-0128624762

La Caixa

2100-2149-31-0100165085

Ni scias ke vi alte taksas la agadon
de Fundación Esperanto.

Fieru do kun ni,

helpu nin daŭrigi la laboron!

Al Antonio Valén

Kara amiko:

Ekde “Frateco”, la (via) esperanta societo en Aragono, kaj okaze de la finfina (oni diras, ke “fino bona, ĉio bona”) publikigo de via libro “El esperanto: lengua y cultura”, ankaŭ ni deziras publike esprimi al vi nian dankon kaj admiron.

Ni volas danki vin ne nur pro la ellaborado de tiu valora libro, sed ankaŭ pro via kunlaboro ĉe “Frateco” dum tiom da jaroj kaj pro viaj pluraj kontribuoj (ekzemple, pri la biblioteka ordigo).

Aliflanke, ĉi tiu libro ne nur estas estiminda por tiuj kiuj jam estas infektitaj de la “verda viruso”, sed ankaŭ povos utili por informi hispanlingve al neesperantistoj kaj eventuale vekti ties intereson pri nia lingvo kaj literaturo: vere ĝi kapablas roli kiel kompaspo por ekaventuri en nian esperantan mondon kaj en nian ver(d)an literaturon.

Bone, kiel vi jam diris apud “PIV”, vi jam estas “plena” kaj “ilustrita” homo. Eĉ vi jam verkis libron, plantis “bibliotekan arbon”... Nur restas al vi generi idon (kvankam “ido” jam ekzistas... kaj ni preferas esperanton...).

Ricevu amikecan kaj “fratecan” saluton de viaj gefratecantoj.

Prelego de Gian Carlo Figliera, okaze de la transdono de la premio Ada Sikoska Figliera al Augusto Casquero, en la kadro de la 12a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo.

Augusto, Ada, Esperanto

Ni ĉi tie kunvenas por asigni premion al merit-plena esperantisto, premion dediĉitan al la memoro de same merit-plena esperantistino. El ili ambaŭ ni klopodas hodiaŭ eltiri personan instruon.

Augusto


La merit-plena laŭreato, al ĉiuj en nia lingva mondo konata, nomiĝas Augusto Casquero de la Cruz.

Kiam Ada kaj mi alvenis en Madrido en 1978, la unuaj esperantistoj renkontitaj estis Juan Carlos kaj Augusto, la animoj de la ĉef-urba Esperanto-Grupo, kiu intence nomiĝis “Esperanto-Liceo” por substreki, ke ĝia kerna misio estas instrui Esperanton. En tiuj jaroj, en la sidejo en Atocha svarmis kiel en formikejo junaj kaj nejunaj esperantistoj partoprenantaj en semajnaj kunvenoj, kaj instruantaj en diversaj kursoj posttagmezaj kaj vesperaj. Komunaj festoj kaj eksterurbaj ekskursoj okazadis regule. La reĝisoro de ĉio estis la tiama fraŭlo Augusto kun la helpo de la fianĉino Alicia. Lia arto —vera arto de vera organizanto— konsistis en tio, ke li sukcesis atingi ĉies kunlaboron sen altrudo, simple demandante en kondicionala formo kun sia konata

sprito kaj bonhumoro “ĉu vi povus helpi pri...?”.

Kiel organizanto de kursoj, prelegoj kaj sociaj programoj Augusto ankoraŭ nun restas senkompara. Sed, lia specialaĵo, preskaŭ lia vivo-plezuro, ĉiam estis la kongresoj. Kiu ne memoras la multajn naciajn kongresojn de li organizitajn en Madrido, Valencio kaj plurloke alie? Kiu ne estas al li dankema pro la Universala Kongreso en Valencio (1993), en kies Infana Kongreseto partoprenis ankaŭ liaj filoj, denaskaj esperantistoj? En tiuj aranĝoj plene montriĝis lia talento ne nur por kunordigi la internajn organizajn fadenojn, sed ankaŭ por konvinki la eksterajn aŭtoritatojn finance subteni la entreprenojn. La laboro neniam sufiĉis al Augusto, homo dotita de nekutima labor-forto kaj iniciatemo. Li aktivis por Esperanto en multaj sektoroj, plej elstare en Esperanto-turismo, realigante veturadojn kaj kunvenojn eksterlande. La vojaĝado tra la Esperanto-universo kondukis lin ankaŭ al gvidado de Esperanto-kursoj en diversaj landoj. Plej laste, ni havis la surprizon vidi lin instruisto de la hispana en Pollando.

Per la Premio “Ada Sikorska Figliera” la Komitato de la 12a Internacia



Premio Ada Sikorska al Augusto Casquero

En Salou, la 4an de oktobro estis unuafoje asignita la internacia Premio “Ada Sikorska Fighiera”. Ĝin ricevis Augusto Casquero el Valencio pro sia plurjardeka sin-dediĉa agado por Esperanto en diversaj landoj kiel kurs-gvidanto, preleganto, organizanto de multaj naciaj kaj internaciaj kongresoj.

Gratulon al nia senlace aganta samideano!

Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Salou volas honorigi Auguston Casquero de la Cruz pro lia sin-dediĉo al la Esperanto-afero tra jar-dekoj. Ni sentas nin mem honoritaj nombri lin en niaj vicoj.

Ada

La alia celo de nia kunveno estas celebri la memoron de la esperantistino, al kies nomo titoliĝas la premio.

Multaj el vi rememoras ŝin, animon de kunvenoj kaj kongresoj, lokaj, naciaj kaj tutmondaj. Antaŭ ĉies okuloj staras ŝia figuro, ĉiam ridetanta, kuranta de unu al alia samideano, brakumante, fotante, helpante ĉiun. En la Esperanto-societoj, sinsekve en Varsovio, Bruselo, Madrido kaj Torino, Ada agadis gvidante kursojn, prelegante, propagandante, organizante festojn, eĉ kuirante kaj, se necese, humile purigante Esperanto-sidejojn. En la

HEF-Bulteno n-ro 368

broŝuro “De tajgo al minaretoj” Ada rakontas pri siaj tragikaj dummilitaj infanaj jaroj en Siberia kaptitejo; la priskribo frapas pro la serena, preskaŭ eksterpersona tono, kiu kontrastas kun la travivitaj hororoj. Feliĉe, diversaj postaj intervjuoj raportas ankaŭ kiel al la suferoj sekvis granda ĝojo, kiam en Varsovio ŝi vizitis Esperanto-kurson de la poeto Julio Baghy, en 1957; la kurso stampis ŝian tutan vivon.

La ĉefa merito de Ada, honora membro de UEA, estas la redaktado dum 34 jaroj de la tiam sendependa kaj plej populara gazeto en nia lingvo “Heroldo de Esperanto”, en kies kolofono tiam legeblis “...organo de la Esperanta Movado”. Al la eldono, transprenita de la fondinto Teo Jung, Ada —profesia ĵurnalistino— dediĉis ĉiun sian spiron, sian tutan entuziasmon, sen alia rekompenco ol la sento de plenumita misio.

Malgraŭ la malsano, ankoraŭ kelkajn semajnojn antaŭ la forpaso, en 1996, Ada ĉiutage volis legi en la hospitala lito la alvenintan materialon de “Heroldo” kaj engaĝigi la gazeton. Ĝuste en tiu malsanulejo ŝi ekverkis sian lastan artikolon. Kiel elmonro de respekto por ŝiaj sentoj, postmorte ŝia korpo estis kovrita per la pola kaj Esperanta flagoj: simboloj de ŝiaj du plej grandaj amoj. Ada nur ŝajne forpasis, ĉar ŝi postlasis al ni devon, nome daŭrigi ŝian laboron kaj tiun de miloj da esperantistoj, kio kondukas nin al kelkaj pripensoj pri la esenco de Esperanto.

Esperanto

La internacia lingvo ne estis kreita por nia propra egoisma plezuro aŭ por uzi ĝin en fermita rondo de kelkaj iniciitoj. Esperanto ek de la komenco proponis sin kiel solvo de la jarmila demando de intergenta kompreniĝo. Tiun ĉi solvon Zamenhof difinis en “La Espero” kiel “la bela sonĝo de l’ homaro”.

En 1887 ne nia lingvo naskiĝis, sed nur ĝia unua gramatiko, kiu poste evoluis en vivantan lingvon, unue skribe per originala kaj traduka beletro, sekve parole en la internaciaj renkontiĝoj de ĝiaj utiligantoj. Temas pri giganta verko, hodiaŭ pludaŭranta, fare de diasporaj generacioj de esperantistoj.

Kvankam Esperanto lingve same valoras kiel ĉiu alia vivanta idiomo, la mondo ankoraŭ ne pretas akcepti ĝin. La kialoj de la rifuzo multas, tiel ĉe la oficia-

laj instancoj kiel ĉe la ordinaraj homoj. Ĉe la politikaj kaj kulturaj aŭtoritatoj la esperantistoj alfrontas i.a. nescion, inertecon, antaŭjuĝojn kaj establitajn interesojn. Ĉe la popol-amasoj, plie aldoniĝas indiferenteco de la homoj antaŭ la ebleco mem aliri al supernacia interpersona komunikado pere de komuna, simpla kaj riĉa lingvo; temas pri rezigno ĝui pri la tuja praktika avantaĝo de Esperanto: la rekta partopreno en tut-ter-globa vivo. Claude Piron profunde analizis la psikan procezon de la aludita mensa forĵeto. Aliaj rimarkoj eblas nur aldoni, ke la viv-horizonto de la plejmulto de la homoj limiĝas al la taga rutino: tute forestas en ili la elano, la ambicio koni la eksterlandajn kulturojn kaj ligi amikajn rilatojn en ĉiuj kontinentoj. La mondajn problemojn ili forpuŝas de la cerbo, delegante ilin al la politikaj instancoj aŭ al socie engaĝintaj societoj kiel la Esperantaj.

Tiun negativan sintenon ni Esperanto-uzantoj, kies patrujo estas la mondo, malfacile komprenas, sed ne povas ŝanĝi ĝin kaj tial devas ĝin akcepti. Aliflanke, la parolantoj de Esperanto formas, jes, nur malgrandan minoritaton, sed minoritaton kiu ne konas lingvajn barojn, kiu vivas intensajn homajn rilatojn preter la land-limoj. Minoritato kvante, sed elito kvalite. El tio fontas la orgojlo esti esperantistoj kaj antaŭi la tempojn venontajn konsciante, ke en la historio fruaj, eĉ persekutitaj, religiaj, politikaj kaj sociaj minoritatoj post longa strebado fine sukcesis plenumi siajn celojn.

Malgraŭ la pasint-jaraj politika kaj ekonomia krizoj —kiuj tradukiĝis ankaŭ en dolorigaj membro-faloj en la Esperanto-Komunumo same kiel en tre multaj aliaj organismoj— la esperantistoj restas fidelaj al siaj idealoj kaj turnas sian rigardon al la estonto. La taskoj antaŭ ili restas la samaj kiel tiuj, al kiuj Ada dediĉis sian vivon. Ĝenerale dirite, necesas plue proponi al la homaro la internacian lingvon Esperanto kaj por persona uzo kaj por ebligi vere modernan komunikadon; tial nepras uzi ĉiujn rimedojn de la hodiaŭa amasa informado: televido, radio, gazetaro, interreto; tre gravas malfermi kursojn kaj instrui la lingvon —ĉe se al limigita nombro de lernantoj, ĉar kvalito pli valoras ol kvanto— per aktualaj aŭd-vidaj interaktivaj metodikoj kaj per profesi-nivelaj lerno-libroj. Kaj, apud la ekstera agado, elstaras la devo flegi la internan utiligon de la lingvo kaj subteni la esperantajn literaturon kaj kunvenojn.

Enirante en detalojn ligitajn al la informado pri Esperanto, ni substreku, ke konsilindas ne troigi pri la disvastigo de la internacia lingvo, por ne krei falsajn atendojn ĉe la ekstera publiko. Nin utiligantojn de Esperanto ne ĝenas sincere agnoski, ke ni estas lingva malplimulto kaj ke la superrego de la angla veras. Ni asertas, tamen, ke la diferenco inter nia lingvo kaj tiu de Britio kaj Usono kuŝas en la facileco kaj supernacieco de Esperanto, kaj en la sento de ĝi kreita aparteni al sen land-lima homaro.

HEF-Bulteno n-ro 368

Ankaŭ la esperantistaj idealoj de Zamenhof restas gravaj, eĉ pli ol ni supozas, en la agado favore al la internacia lingvo. Iliaj aktualeco kaj altiro-forto kreskadas en mondo, kiu pli kaj pli strebas al politika kaj ekonomia unueco. Ni ripetas de pli ol unu jarcento, ke neŭtrala supernacia lingvo —defendanta la egalrajtecon de la minoritataj lingvoj— estas antaŭkondiĉo de ĉia internacia unueciga procezo. Jam tre longe antaŭ la ekzisto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de la Eŭropa Komunumo la esperantistoj asertis, ke la internacia lingvo —sen la pretendo elimini konfliktojn kaj militojn— esence kontribuas al la alproksimigo de popoloj, al interkompreniĝo kaj toleremo inter la homoj. Kaj ni esperantistoj ne laciĝas ripeti, ke la homara lingvo-problemo povos trovi solvon nur per politikaj rimedoj, pri kiuj respondecas sole la politikaj instancoj.

Al la supraj celoj la uzantoj de Esperanto disponigas la lingvan instrumenton kaj jarcentan sindediĉon en malgranda sed kohera Movado, organizita en spirito de unueco. Parolante pri unueco, ne eblas prisilenti, konklude, ke en la agado por Esperanto misagordas sekto, kiu tretas la skribitan volon de Ada, eldonas pirate ŝian gazeton, dividas la esperantistojn per senĉesaj kvereloj, subfosas la organizitan Movadon, UEA-n kaj ĝiajn atingojn inkluzive de la Universalaj Kongresoj.

Fideleco al niaj principoj, al nia historio kaj al niaj asocioj: jen en kio Ada kre-dis: jen ŝia lasta mesaĝo.



Ĉirkaŭ


la mondo

* En la 90a UK en Vilno okazos la 58a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, kaj ankaŭ studsesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA.

* Okazis en Rusio la 60a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Ĝin partoprenis 355 homoj el 27 landoj. Partoprenis 8 hispanoj.

* En Koreio, Esperanto estas instruata en du universitatoj (Dankook kaj Ŭonkŭang). Por dua semestro en la jaro 2004, sume 185 gestudentoj aliĝis al la lecionoj, respektive al Dankook 130, al Ŭonkŭang 55. La studentoj oficiale gajnos 2 notojn post kvarmonata leciono. Jam Esperanto fariĝis populara almenaŭ en la du universitatoj. Docento estas LEE Jung-kee.

* La estraro de la eksterordinara reta projekto OpenOffice.org (kreanta liberegan oficejan programaron alternativan al Microsoft Office) ĵus oficiale akceptis la projekton pri esperantigo de la programaro. En la retejo OpenOffice.org aperis subdomajno <http://eo.openoffice.org/> kaj la sciigo pri la Esperanta versio legeblas sur la ĉefa paĝo de la projekto (en la parto "Pliaj naciaj lingvoj". La Esperan-



"La Revuo Orienta" atingis sian numeron 1.000. Gratulon!

to-versio estas preparata de la internacia teamo, gvidata de Joey STANFORD kaj Tim MORLEY, ĝi estas ĝis nun la sola reta projekto rekte aŭspiciata de UEA.

* La 9an FAME-premion, 5.000 eŭrojn, ricevis la nederlanda-frisa folkmuzika grupo "Kajto". Antaŭ la premiigo okazis koncertoj en la urboj Freiburg, Stuttgart kaj Aalen. La premion asignas FAME-fondaĵo kune kun la urbo Aalen (suda Germanio) ĉiun duan jaron por elstara agado sur la kampo de interpopola komprenigado.



Esperantaj gelernantoj el pluraj landoj studentantaj en Pollando



La muzikgrupo Kajto ricevas la FAME-premion

Profesiaj studoj pere de Esperanto

En la urbodomo de Bydgoszcz okazis estrarkunsido de la Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo, kies prezidanto, Konstanty Dombrowicz, estas samtempe urbestro de Bydgoszcz (400 mil loĝantoj). Inter la invititoj estis nia samideano Augusto Casquero, kiu ricevis donacon de la urbestro.

Hispana Esperanto-Federacio

www.esperanto-es.net

Kontonumero de HEF ĉe BBVA:

0182-1252-31-0204011961

Internacia Pedagogia E-Kurso dum (02.11 ĝis 02.20) gvidata de Ascí. Ewa Bondar de IEI en Hago, Ascí. Augusto Casquero, red. Barbara Pietrzak el Pola Radio, Marcel Delforge el Belgio, kelkaj polaj fakuloj pri glottodidaktiko kaj pedagogio el la Centro pri Edukado por Instruistoj kaj reprezentantoj de ILEI. Samtempe okazos kursoj de fotado kaj video-filmado gvidataj de Zdzislaw Blazejczyk, red. Roman Dobrzynski kaj Romuald Puciul. Ĉiu kurso, kun naŭ tranktoj, asekuro kaj parta manĝado kostos 200 eŭrojn.

30 E-Tagoj de Bydgoszcz kun 27 Internacia AKB-Sesio kaj Internacia Kurso por E-vojaĝgvidantoj (04.23 ĝis 05.03) sub Honora Protektado de la Prezidento de la Urbo Bydgoszcz. La partopreno kostos 200 eŭrojn.

Augusto Casquero

Muziko



* Aperis la disko “Mi Estas” de Ĵak le Puil. La konata franca kantisto registris unuan albumon sur kasedo, “Danĝera ul’”, en 1977, kaj poste tri aliajn, “Revenas mi” en 1980, “De Pont-Aven al Varsovi” en 1985, kaj “Ne donu tro” en 1993. Do estas ne malpli ol 27 jaroj da ĉeesto kiun Ĵak dediĉas per tiu ĉi albumo, ŝtopita je dolĉa mokemo, socipolitika kritiko, kaj multe da tenero. Cetere, oni trovas en ĝi kvar originalajn titolojn komponitaj de Ĵak laŭ tekstoj de konataj poetoj.

* Aperis “Plaĉas al mi” de Kaj Tiel Plu. La disko proponas ĉarman vojaĝon en akompano de flutoj, mandolinoj, diversaj perkutiloj, kaj la “sono” de la esperanta lingvo, tra aparta muzika stilo. Kaj Tiel Plu volis doni al ĉi disko vivantan sonon, kvazaŭ koncertan, kaj ĝi inkluzivis du kantojn adaptitajn de aktualaj artistoj: la kataluno Ramon Muntaner kaj la okcitana (gaskona) bando Nadau.



* Ankaŭ aperis la novaj diskoj de “Hotel Desperado”, “Ĵomart kaj Nataŝa”, kaj “T. Faverial”. Pri ili vi legos en venonta numero de Boletín.

* DĴ Roĝer’, kiu partoprenis en la “Elektronika Kompilo”, laboras nun super nova projekto: la disko “Supernova”, kiu temos pri Gotika kaj malmola roko. En la KD, kiun oni registras en Brazilo, kunlaboras multaj muzikistoj, ĉefe gitaristoj kaj tute novaj kantistoj.

* “Rebela Sono” estos la titolo de dua KD de la finna bando

Dolchamar, kiu estos preta komence de 2005. Ĉi nova disko sonos multe pli roke ol la unua, kaj ni ne dubas ke ĝi furoros okaze de la junularaj Esperanto-renkontiĝoj.

* Martin Wiese, kantisto de la bando Persone, preparas diskon sole kun novaj muzikistoj.

* JoMo slave rokos en sia tria tutesperanta disko, en kiu li kantos

akompanata de la rokmuzikistoj de “La liberecanoj”, kaj ankaŭ de la muzikistoj de la tradicia folkloro slava bando Matrioĉka.

Vinilkosmo

HEF-Bulteno n-ro 368

Alia grava atingo

La brazila bonreputacia retejo MusicExpress estas nun en Esperanto! Iru al: www.musicexpress.com.br/eo kaj ekkonu ĝin!

Ĝi ricevas pli ol 300.000 vizitojn ĉiunmonate, kaj estas konata en Brazilo kiel gastigejo de bonkvalitaj artistoj.

En MusicExpress vi trovos informojn pri artistoj de la tuta mondo, en pluraj stiloj kaj lingvoj (dekoj da esperantaj), MP3-dosierojn, muziktekstojn kun akordonomoj, komputilajn programojn, kaj ĉiusemajne aktualajn novaĵojn pri muziko, pri tio kion faras niaj artistoj, kaj pri ĝeneralaj muzikaj temoj.

Novaj muzikaĵoj, novaj altkvalitaj artistoj kaj novaj akordaĵoj diversstilaj estas aldonataj konstante. Kaj aliaj frandaĵoj estas preparataj, garantiante ke MusicExpress estos tiel bona en Esperanto kiel ĝi jam delonge estas en la portugala.

MusicExpress en Esperanto ne estas retejo pri esperanta muziko. Ĝi estas la unua retejo en Esperanto pri muziko! Pro tio, krom havi riĉan kolekton da materialo je via dispono, ĝi donacas al vi

efikan propagandon de la Internacia Lingvo.

Vizitu ĝin ofte, disvastigu al via amikreto, informu al la neesperanta gazetaro!

Ĝuu MusicExpress-on, same kiel jam faras centmiloj da homoj el la tuta mondo.

Flávio Fonseca

Lasthoraj novaĵoj

* Pola Radio prezentis intervjuon kun Joxemari Sarasua pri lia traduko de kelkaj noveloj de Pio Baroja, aperigitaj en la volumo “Suzana kaj la ĉasistoj de muŝoj”. Poste ĝi prezentis unu el la noveloj: “La ombro”.

Dario Rodríguez

* La HEJS-membroj de Madrido festos la Zamenhofan tagon en la CO de HEF la 11an de decembro. Vidu: www.esperanto-es.net/hejs.

Biblioteko

Juan Régulo

Jen la listo de objektoj laste alvenintaj al la Biblioteko Juan Régulo:

* **Romaj elegioj / La taglibro** Goethe; Literatura Mondo 1932; hu; Jorge Camacho.

* **Markoloro.** Ngo Thi Kim Cuc kaj aliaj; Fremdlingva eldonejo; 1985; vn; Jorge Camacho.

* **Nova teatro. Monologoj** Lapenna, Emilija; Kroatia Esperanto-Ligo; 1974; hr; Jorge Camacho.

* **Vojaĝlibro de Hungario** Nimeth, Gyula; Eldonejo Pannonia; 1965; hu; Jorge Camacho.

* **Leteroj el Japanio** Kheir-Khah, Reza; Libroteko Tokio; 1993; jp; Jorge Camacho.

* **Memor' mortiga** Johansson, Sten; Al-fab-et-o; 2003; se; Jorge Camacho.

* **Mi volis tuŝi la sunon** Partljic, Tone; Inter-kulturo; 1994; si; Jorge Camacho.

* **Streĉita Kordo** Kalocsay, K.; Literatura Mondo; 1931; hu; Jorge Camacho.

* **Zejnab' kaj Aman'** Alimgan, Hamid; Komisiono pri internaciaj ligoj de esperantistoj de Uzbekistano; 1968; Jorge Camacho

* **Ten Esperanto Poets in English translation** Zamenhof, L. L. kaj aliaj; The Esperanto Centre ?; 1991; gb; Jorge Camacho.

* **Al la nova etapo**; Internacia Sekretariaro de la Landaj Proletaj Esperantaj Lingvo-komisionoj (ISLK); Ekrelo; 1932; de; Jorge Camacho.

* **Zamenhof**; Drezen, E.; SAT; 1929; de; Jorge Camacho.

* **Kanto super lulilo** (ok slovakaj aŭtoroj) Podjavorinsk^L, L'udmila; Cs. sekcio de MEM; 1976; Cs; Jorge Camacho.

* **Ruĝa Rivero.** Nguyen Trai. Fremdlingva Eldonejo; 1980; vn; Jorge Camacho.

* **Montara Vilaĝo**; Yeh, Chun-Chan; Ĉina Esperanto-Eldonejo; 1984; cn; Jorge Camacho.

En julio venis plia donaco por la biblioteko Juan Régulo. Ĝi estas filatela kolekto sendita de Emilio Folgado López, el Badajoz, konsistanta el:

1) Po du kovertoj plus poŝtkartoj, kun kongresaj stampoj, inter la jaroj 1964 kaj 1999. Du kovertoj de IPA (International Police Association). Sur ili apenaŭ la frazo: "Servo por amikeco". Po du ilustritaj poŝtkartoj sen stampo el kelkaj HEF-kongresoj (inter 1960 kaj 1985), la 53a Universala Postkongreso (1968) kaj la 2a Andaluza Kongreso (1985). Du folioj kun glumarkoj pri diversaj kongresoj inter 1964 kaj 1986. Aliaj specimenoj.

Ana Manero

HEF-Bulteno n-ro 368

Jen alia bonega apoginda laboro farata de esperantistoj en Interreto. Nepre vizitu la paĝojn de Indymedia en Esperanto. Vi ĝuos:

<http://barcelona.indymedia.org>

Indymedia en Esperanto

Kataluna E-Asocio sukcesis enkonduki Esperanton en la novaĵ-servejon Indymedia Barcelona.

Indymedia estas granda reto prizorgata de grupoj en la tuta mondo kaj organizata per retlistoj kaj asembleoj. La projekto Indymedia naskiĝis okaze de la manifestacioj kontraŭ la kunveno de la Monda Organizaĵo pri Komerco en Seatlo en 1999. La informcentro tie aranĝita funkciis kiel renkontiĝejo, kie ĵurnalistoj povis trovi informojn kaj/aŭ publikigi siajn proprajn.

Unu jaron poste, en kunveno en la okupita domo Espai Obert (Malfermita Loko) en Barcelono oni decidis krei Indymedia Barcelona, danke al la laboroj de aliaj Indymedia-centroj kaj al volontula laboro. Ĝi fariĝis la unua centro funkcia en Europo. De tiam, Indyme-



dia Barcelona kreskis ĝis ĝi fariĝis tio, kio ĝi nun estas: libera kaj kolektiva loko, kiu permesas, ke esprimu sin individuoj, socialaj movadoj kaj ĉiaj organizoj sen eblecoj aliri la amaskomunikilojn.

Sur tiu bazo, la asembleo de Indymedia Barcelona decidis prezenti esperanton kiel novan lingvan eblecon por legi la ĉefartikolojn. Per Esperanto ĝi “celas kontribui al pli justa mondo, en kiu neniu, pro naskiĝo aŭ ekonomia nivelo, havu pli da eblecoj scipovi la superre-gantajn lingvojn; t.e., ĝi celas eviti diskriminacion pro lingvaj kialoj”. Per tio Esperanto prezentigas samnivele apud la kataluna, la hispana kaj la angla.

Temas pri la dua Indymedia-centro en kiu esperanto estas enkondukita: jam de kelkaj jaroj ankaŭ la brazila funkcias en esperanto:

www.midiaindependente.org/eo/blue/

KEA

—27

“Le Monde Diplomatique”

Alia lukso en Esperanto!

<http://eo.mondediplo.com>

Anti-internaciismo kaj Esperanto en la hispana faŝismo 1930—1936

La apero, komence de la jaro 1930a, de la unua numero de la revuo “La Conquista del Estado” (La Konkero de la Ŝtato), alportis du gravajn faktorojn al la politika vivo de nia lando dum la lastaj monatoj de la Monarkio kaj la ekigo de la Dua Hispana Respubliko. Unue, tio signifis la apero de la unua faŝisma grupo en Hispanio kaj, due, la eniro en la politikan arenon de la unua faŝisma teoriisto en nia lando: Ramiro Ledesma Ramos. Li estis la vera enkondukanto de la faŝismo en Hispanio, kaj tio ne nur el teoria vidpunkto sed ankaŭ rilate la politikan rezonadon kaj la adopton de la simbolaro, tre gravaj elementoj por la faŝismaj partioj dum tiuj jaroj en la tuta Eŭropo. Fakte, Ledesma Ramos estis la kreanto de la politika termino “naci-sindikalismo”, paralela esprimo al la germana “naci-socialismo”, kaj li estis ankaŭ la desegnanto de la ruĝ-nigra standardo kaj eĉ la ekuzanto de la hispana faŝisma simbolo: la jugo kaj la sagoj.

Ramiro Ledesma Ramos estas pli influita de la germana nazismo ol de la itala faŝismo. Tio videblas en liaj verkoj kaj artikoloj kaj ankaŭ en la strukturo de tiu unua faŝisma grupo, kiu post kelkaj monatoj kunfandiĝis kun la “Juntas Caste-

llanas de Acción Hispánica” (Kastiliaj Grupoj por la Hispanema Agado) de la valadolida Onésimo Redondo. Ambaŭ kune kreis la JONS, Juntas Ofensivas Nacional Sindicalistas (Ofensivaj Grupoj Naci-Sindikalistaj), strukture kaj eĉ laŭnome tute similaj al la germanaj hitleraj SA aŭ StrumAbteilungen.

Kiel dirite, Ramiro Ledesma estas pli nazisto ol faŝisto, kaj kvankam kelkaj aŭtoroj opinias, ke li ne estis kontraŭjuda, oni povas aserti, ke li akuzas al la juda raso pri du kreaĵoj:

a) la kapitalismo, kies origino, laŭ Ledesma, estas la bank-spekulantoj ĉiuj jud-devenaj, kiuj kondamnis al milionoj da germanoj al la senlaboreco.

b) La marksismo, elpenŝaĵo de la juda Karl Marx kiu erarigis la sekvendan vojon de la laboristoj.

Ramiro Ledesma rekte mencias Esperanton sur la 3a numero de la revuo JONS, ene de artikolo titolita “La Volonteco de Hispanio” kiam li skribis: “la inundo de enmigrintoj, kaj ties raciaj postrestaĵoj, kune kun iu senduba laceco en la plenumo de la kolektivaj taskoj, es-tigis ĉe multaj homoj en Hispanio la ĝeneralan senton ke endas senti sin unue homo kaj poste hispano. Al ĉi tiuj homoj

frida-koraj kaj sekaj, sen pulso kaj nacia koro, estas necese montri, ke ilia deflankiĝo for de la hispana esenco malhelpas kaj malpermesas al ili atingi la homan kategorion kiun ili proklamas.

Nenio pli absurda kaj negativa ol tiu internaciismo homarana, homrajt-proklama, mond-civitana kaj parolanta esperanton". Videblas, ke Ledesma similigas la internacian lingvon al la inspiro de la mond-civitaniismo bazita sur la homaranismo kaj la interkompreniĝo.

Kaj ĉi tiuj terminoj estas kritikendaj laŭ Ledesma, kiu opinias, ke oni devas abomeni Esperanton, ĉar ĝi sopiras krei internacian komunumon bazita sur la egaleco de ĉiuj popoloj. Sendube Esperanto, ĉar kreaĵo de judo, estas, simile al marksismo kaj al la kapitalismo, kritikebla ankaŭ pro sia deveno.

En la jaro 1933a Hitlero atingas la regpovon en Germanio, kaj en Hispanio diversaj influantaj grupoj, kiel la grandaj kapitalistoj, entreprenistoj, bankistoj kaj la Eklezio, vidas, ke danke al la faŝismo en Italio kaj la nazismo en Germanio oni liberigis ambaŭ sociojn de la danĝeraj, por ili, revolucioj bazitaj sur la anarkiismo kaj la soveta marksismo, kaj ke la burĝoj fariĝis la ekonomiaj motoroj kaj la kreantoj de riĉeco en tiuj landoj. Pro tio la hispana oligarkio serĉis tiun


partion kaj gvidanton, kiu, aparte de la tro tradiciemaj CEDA, dekstrema katolika partio, kaj "Renovación Española" (Hispana Renovigo), la monarkiista partio,

liberigu la hispanan socion de la marksisma kaj anarkiisma minacoj. Tiu nova gvidanto estis juna madrida advokato, proksima al la andaluzaj ter-havantoj pro sia jereza origino, li nomiĝis Jose Antonio Primo de Rivera, la filo de la diktadoro Miguel Primo de Rivera, kaj la

nova partio nomiĝis Falange Española (Hispana Falango), nomo aperinta en la mallongigo FE (Hispana Faŝismo). La itala faŝismo estis pli bone rigardita de la hispana oligarkio ol la atea kaj antiburĝa germana naci-socialismo.

En neniu verkaĵo aŭ artikolo Primo de Rivera parolas pri Esperanto, tamen li

arde kritikas unu el la ĉefaj principoj sur kiu baziĝas nia movado, tio estas: la internaciismo. Fakte, okaze de renkontiĝo de faŝismaj partiestroj okazinta en Montreŭ (Svisio) en la jaro 1935a, Jose Antonio Primo de Rivera klarigis, ke: "la tipa hispana karaktero estas tro individuema kaj krome Hispanio suferis pro tri akraj internaciaj movadoj: la framasonismo, la socialismo kaj la kapitalismo, kaj verŝajne pro aliaj internaciaj povoj regantaj la hispanajn aferojn". Do, sendube Primo



Julio Mangada



Ramiro Ledesma

de Rivera, opinius, ke Esperanto estis internacia movado tial do fremda al la hispanemaj interesoj. La juda origino de la kreanto de Esperanto, male al la opinio de Ramiro Ledesma, ne estus malavantaĝo por nia lingvo. En la jaro 1934a la Hispana Falango kaj JONS unuiĝis. La Reglamente de la ekstera branĉo de la nova partio ebligis la aliĝon de la hispanoj loĝantaj en eksterlandaj ŝtatoj kaj ankaŭ al eksterlandanoj ligitaj al la hispanoj pro la sango, la lingvo aŭ la raso. Eble pro tio, la reprezentanto en Turkio de la nova partio demandis al la estraro ĉu estus eble akcepti la aliĝon de la sefardaj judoj, do hispan-devenaj. La opinio de Primo de Rivera ŝajnis unuavide favora, ĉar laŭ li deklaris en la Parlamento en la jaro 1934a: "Hispanio ne estas raso aŭ aro da kutimoj, sed la imperiisma pretendo unuigi lingvojn kaj kutimojn universal-celc". Tamen ĉi afero definitive solviĝis en la la jaro 1938 kiam, okaze de renkontiĝo de la estraro de la Partio, oni decidis ke la eksteraj frakcioj de la Hispana Falango neniel povus permesi la aliĝon de judoj, eĉ se ili estas hispan-devenaj.

Nu, ni jam vidis la rilatojn inter Esperanto, Internaciismo kaj la hispana faŝismo, nun ni devus vidi la kontraŭan version, tio estas: respondi al la demando ĉu iam la faŝismo interesis la tiutempajn hispanajn esperantistojn. Malgraŭ la evidenta fakto, ke ambaŭ terminoj "Esperanto" kaj "Faŝismo" tute kontraŭas unu la alian, oni ne povas forgesi ke

en aliaj ŝtatoj, ekz. en Germanio, ekzistis parolantoj de la internacia lingvo kiuj kreis faŝisman E-grupon (la Nazionalsozialistischer Deutscher Esperanto-Bundo), kaj ankaŭ ke en Aŭstrio, kie la Registaro malpermesis la laboristan E-asociacion kaj permesis la neŭtralan E-movadon, ĉi tiu lasta branĉo de la E-movado amase apogis la nazieman aŭstrian reĝimon. Tamen, oni povas aserti, ke en Hispanio la Hispana Falango ne ricevis dum tiuj jaroj eĉ la plej minimuman favoran opinion de la hispana esperantistaro. Tute male, el politika vidpunkto, la plejmulto el la tiuepokaj hispanaj esperantistoj estis ĉu socialistoj ĉu anarkiistoj, kaj multaj el ili ankaŭ framasonoj, do ili situis tute kontraŭflanke al la hispana falangismo. Elstaraj esperantistoj kiel Francisco Azorin estis aktiva parlamentano membro de la socialisma partio PSOE, kaj samideanoj, kiel Manglada aŭ Redondo, estis membroj de la UMRA, Unión Militar Republicana Antifascista (Militista Respublikana Kontraŭfaŝisma Unuiĝo).

Eble la plej kruela lukto inter Esperanto kaj la faŝismo en Hispanio okazis kiam grupo de falangistoj, kun sia valadolida ĉefo, la elstara Onesimo Redondo, abrupte renkontis en la unuaj tagoj de la hispana milito la kolonon gvidatan de kolonelo Julio Mangada, unu el la plej aktivaj tiutempaj esperantistoj. La faŝisma ideologo mortis dum la pafado.

José María Rodríguez Hernández

HEF-Bulteno n-ro 368

Jarabonoj kaj kotizoj por 2005

Boletín de HEF (eksterlandaj abonantoj, enlandaj vidu sur la 32a paĝo)	30 €
RET-INFO (12 monatoj)	19 €
✓ [P] HEF.	
Universala Esperanto-Asocio	
Individua Membro kun Gvidlibro MG	9 €
Individua Membro kun Jarlibro MJ (-T)	22 €
Individua Membro plus abono al E-o MA (-T)	55 €
Simpla abono al Esperanto, sen membreco (SA)	35 €
Simpla abono al Kontakto, sen membreco (Kto)	21 €
Societo Zamenhof, sen membreco en UEA (SZ)	110 €
✓ Rim: La kategorio (MG) ne rajtigas rabaton en la UK. La kategorioj MJ kaj MA inkluzivas por la junuloj (ĝis 29 j.) membrecon en TEJO kaj ricevon de Kontakto. [P] Pedro A. Garrote; Apartado 119 — Esperanto; 47080 Valladolid; Banco Español de Crédito (BANESTO), Konto: 0030 6002 74 0000901271.	
La Gazeto (ses numeroj)	27 €
[P] Barcelona E-Centro; Bassegoda 40, 3 ^a , 1 ^o ; 08028 Barcelono.	
Heroldo de Esperanto	32 €
Femina	20 €
Literatura Foiro	30 €
Internaciisto	15 €
La Ondo de Esperanto (12 numeroj jare)	27 €
La migranto	10 €
[P]: Luis Serrano; C/ Font Nova, 32; 08202 Sabadell; Tel. (93) 7275021; Banco Sabadell n-ro: 0081 0900 82 0006712480. (Por bank-ĉeko aldonu 1,5 EUR)	
Sennaciulo (kotizo al SAT + abono + Sennacieca Revuo)	36 €
[P]: Pedro Sanz; pmariass1@auna.com; Uno-e de BBVA, Konto: 0227 0001 85 0200526929.	
SATeH (kotizo)	6 €
[P]: Pedro Sanz; pmariass1@auna.com; Caja Madrid, Konto: 2038 1787 43 6000182731.	
KAE-Infomilo	? €
✓ [P] Santiago Torné; Roca 22, 3-cr, 1-a; 08208 Sabadell; Caixa 21000461960200045498.	
La Gazeto	20 €
[P] Barcelona E-Centro; Bassegoda 40, 3 ^a , 1 ^o ; 08028 Barcelono.	
HEF-Bulteno n-ro 368	

Aniĝilo por 2005

(Foto)kopiuj kaj poŝtu aŭ faksu al la HEF-oficejo. Bv. skribi klare.

Personaj datenoj :

Kompleta nomo : Annumero:
Adreso :
Poŝtkodo kaj urbo : Tel. :
Naskiĝdato : Retadreso:

Aniĝo :

- OM ordinara membro. 30,00 €
- kun junulkarto 27,00 €
- PM patrona membro 60,00 €
- KM kolektiva membro 60,00 €
- EM (nur por jamaj EM-anoj 1995e) 25,00 €

Ĉiu ano ricevas *Boletín*; infanoj ĝis 12 jaroj *Juna Amiko*; junuloj inter 13 kaj 30 jaroj, *Kontakto*.
Kaj ĉiuj, ĝenerale, 10% rabaton en la aktivajoj organizitaj de Hispana Esperanto-Federacio.

Pagmaniero :

- Bankordone (plenigu la malsupran formularon).
- Enspezo en konton 0182-1252-31-0204011961 de BBVA (kunsendu spezilono).
- Ĉeko por "Federación Española de Esperanto" (aldonu 3 EUR).
- Elspezo en la konton hefb-m de U.E.A. (kunsendu ĝirilkopion).

Subskribo:

Dato:

DOMICILIACIÓN BANCARIA

Banco o caja:

Dirección:

Código postal y localidad:

C.C.C.: ____ / ____ / ____ / _____
Entidad Sucursal D.C. Cuenta

Muy señores míos:

Les ruego atiendan con cargo a la cuenta arriba indicada los recibos que les sean presentados por la Federación Española de Esperanto en concepto de cuota anual, hasta nueva orden.

Fecha:

Nombre y firma del titular:

Pola Radio

La Esperanto-Redakcio de Radio Polonia elsendas en la Internacia Lingvo ekde la jaro 1959a. Nun la uzo de interreto signifas vastigis la rondon de aŭskultantoj en la tuta mondo.

En la Redakcio laboras kaj kunlaboras kungi la videbligantaj surfote spertoplenaj, sed ankaŭ spertigantaj junaj ĵurnalistoj: Milada Szewcowa, Michał Wyszogrodzki, Wojciech Usakiewicz, Anna Limont, Barbara Pietrzak (Estro de la Redakcio), Gabriela Kosiarska, Jerzy Uspiński, krome Ewa Krach kaj Andrzej Pettyn.

R. P. celas ĉiutage informi pri politikaj, sociaj kaj kulturaj eventoj en Pollando. Krome, ĝi dedikas apartan lokon al la vivo de la E-medioj, kaj al la problemoj de la demokrata lingvokomunikado. Ĉe ĉi tiu R. P. pritraktas multajn temojn laŭ peto de aŭskultantoj.


Tel.: + 48 (22) 6459 337

Faksilo: + 48 (22) 645 59 17

esperanto.redakcio@radio.com.pl



Pola Radio, Radio Polonia
Esperanto-Redakcio
00-970 Varsovio, Pollando



Libroservo

Luis Serrano Pérez

Font Nova 32, 08202 Sabadell

luis_serrano@mixmail.com

tel: 937-275-021

Konto ĉe *Banco Sabadell*:

0081-0900-82-0006712480.

